# Novjorka Prismo

Numero 127 Oktobro 2003


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia oktobra kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 17-an de oktobro 2003, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, A - 2nd floor, NYC
(between Bowling Green and Exchange Place)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Pluraj membroj prelegetos pri diversaj religioj; sekvos diskutado pri religio. ★

## Protokolo de la kunveno de la 19-a de septembro 2003




La kunveno okazis ĉe nova loko: 50 Broadway, en la plej suda parto de la insulo Manhattan. La seĝoj de la nova ĉambro estas tre komfortaj, sed la ĉambro mem malgrandas. UFT, la sindikato de instruistoj, kiu provizas ĉambron al nia klubo tra la jaroj, translokiĝis de 260 Park Avenue South al 50 Broadway.

Je la sepa horo ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon kaj bonvenigis ĉiujn al la nova sezono kaj al la nova loko. 24 personoj ĉeestis.

Ni havis gaston el Vieno, Asghar SAJADIAN, origine el Irano. La ĉeestantoj parolis kun li dum kelkaj minutoj, farante demandojn pri la E-o movado, kaj precipe pri la junulara agado en Irano.

Irene GINSBURG kaj sia fratino aperis mallongtempe, nur por demandi, ĉu oni vendas, ĉe la nuna kunveno, librojn poseditajn de Julius BALBIN. Estis ĉirkaŭ 1100 libroj, inkluzive ĉirkaŭ 200 kopioj de libroj skribitaj de li mem. S-ro BALBIN translokiĝis al Belgio.




Rochelle F. GROSSMAN rimarkigis la ĉeestantojn al la eta standardo de Litovio, kion ŝi starigis sur la tablo antaŭ si, honore de litova ĉeestanto, Arvydas KAZLAUSKAS. Ni okazigis neplanitan diskuton pri Esperanto en la interreto kaj en radioelsendoj. Arvydas estas komputilinĝeniero, kiu loĝis en la urboj Kaunas kaj Vilnius, kie la urbestro estas Esperantisto.

INUI Mitsutaku, el Kjoto, la antikva ĉefurbo de Japanio, ĉeestis. Ni parolis kun li pri Ŝintoismo kaj pri Oomoto. Li menciis la Esperanto-Kongreson de Oomoto en Japanio.

La protokolo de la maja kunveno estis akceptata.

Nijl BLONSTEIN dediĉis multe da tempo portante valizojn de libroj 2-3 fojojn sen aŭtomobilo el la apartamento de BALBIN al sia propra apartamento, ĉirkaŭ 10 stratoj for.

Tomaso menciis la librofoiron *New York is Book Country* (Novjorko estas Librolando), kiu okazos la 21-an de septembro, kaj li serĉas volontulojn por starigi tablon ĉe la foiro.

Rochelle montris tolon senditan al nia klubo de Brian SINGER, kiu ricevis ĝin de s-ro MARAMBA el Tanzanio. La tolo aspektas kiel verda tablotuko kun nigraj desegnoj de fiŝoj.

Je la oka horo ptm, Nijl raportis pri siaj spertoj en Boston kaj en Cambridge, Mass., dum la fino de junio kaj la komenco de julio, ĉe la kongreso de la Unitarana Preĝejo, kaj ĉe la ELNA kongreso. Li parolis pri prelegoj, muzikistoj, piroteknikaĵoj, kaj aliaj distraĵoj. Aliaj, kiuj vojaĝis al la kongreso, ankaŭ parolis pri siaj spertoj, kaj pri aliaj personoj, kiujn ili renkontis dum la Kongreso.

Rochelle parolis pri la Universala Kongreso en Gotenburgo, Svedio. Ĉar ŝi vidis la urbon kiam ŝi vizitis ĝin antaŭ kelkaj jaroj, kaj ĉar ŝi havis multe da laboro ĉe la kongreso, tial ŝi ne havis tempon rigardi la urbon ĉi-jare. Personoj el 63 landoj ĉeestis la UK-on, kiu havis multajn eventojn. La nepo de ZAMENHOF ĉeestis. Tomaso oficiale fermis la kunvenon ĉe 8:45 ptm. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Pulmerkato




Tom Eccardt kaj la Medranoj ĉe la pulmerkato.

Dimanĉon, la 21-an de septembro, kvin membroj de ESNY partoprenis en la grandega pulmerkato de Stuyvesant Town, kiu okazis ĉi jare dum la aŭtuno anstataŭ dum la printempo. Nia grupo troviĝis inter la pli ol mil lokaj loĝantoj, kiuj vendis siajn diversajn aĵojn. Tom Eccardt disdonis informilojn pri Esperanto dum Nancee Medrano vendis siajn varojn. ★




– *Jim MEDRANO*

---

## Koncerto



*Ni lastatempe ricevis la ĉi-suban informon de nia membro, Jon Liechty, pri koncerto en kiu li mem ludos pianon.* –J.M.

CHIRON Performing Arts presents: a concert event: *From Shadows to Light*, featuring the World Premier of Christopher Kaufman's *The Phoenix*, music and dance dedicated to the City of New York with the music of: Christopher Kaufman, Igor Stravinsky, guest composer/flutist Robert Dick, guest composer/performer Elliott Schwartz. Dancer Lara Kohn and Visual Artists: World Class Performers: Bombastiq Brass, Pianist Idit Meshulam, Violist George Rosenbaum, Clarinetist Amy Zoloto. Haim Avistur and the CHIRON Trombone Choir will perform the World Premier of Kaufman's . . . *At the Gates* . . .

**Sunday – November 9th – 7:00 p.m. at The Flea theater** – 41 White St., Tribeca. CALL: 516-432-2980 for information/tickets ($20) ★


– *Jon LIECHTY*
*<frenezulo@yahoo.com>*

---

## Laste vizitis el Aŭstrio

Antaŭnelonge, Asghar SAJADIAN revenis al Novjorko por plia vizito. Li restis kun Nijl Blonstein, sed ankaŭ vizitis min kaj gesinjorojn Medrano. Kiel dirite en la protokolo, Asghar estas irana sed nun estas aŭstra civitano. Li studis psikologion, kaj nun komencas sian karieron. Ĉi-foje, Asghar ankaŭ vizitis Montrealon kaj Vaŝingtonon. ★

– *Tom ECCARDT*



*Tom Eccardt kun Asghar Sajadian el Aŭstrio.*

## Laste vizitis el Svislando

De la 7-a ĝis la 10-a de oktobro restis ĉe mi sviso Dieter ROOKE kaj lia filo Ciril. Ni ĝuis tre interesajn konversaciojn pri multaj aferoj. Ili ankaŭ vizitis Alfredo kaj Tomoko en Peekskill. Ciril estas denaska Esperantisto. ★

– *Tom ECCARDT*

---

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Oktobro 2003** — **17**

ESNY KUNVENO

Prelegetoj kaj diskutado pri religio

*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT, 50 B'way*

**Novembro** — **2**

Tagmanĝo

*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe* ***IBM Plaza***

(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 128)

**21**

ESNY OPEN HOUSE

*Friday, 6:30 p.m. at UFT, 50 Broadway*

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, A - 2nd Floor, NYC
(between Broadway and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Kafejo Mondo



Post la unua klubkunveno en la nova sidejo de UFT, pli malpli dek homoj iris al restoracio tre proksima al la kunvenejo, kaj sufiĉe simila al Emma's Dilemma, nia kutima post-kunvena restoracio.



Ĝi nomiĝas Cafe World, tre taŭga nomo por Esperanta renkontiĝejo. Krome, ĝi estas pli luksa ol Emma's Dilemma. ★



– *Tom ECCARDT*

---


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

| Prezidanto | Korespondа Sekretariino | Protokolisto |
|---|---|---|
| Thomas Eccardt (212) 477-6516 | Rochelle F. Grossman (718) 457-1490 | Stuart Green (631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto** | **Kasistino** | **Program-Direktoro** |
| Thomas Leong (718) 981-4252 | Sofiya Soskina (914) 738-6084 | Neil Blonstein (212) 663-2020 |



**Novjorka Prismo**
Numero 127 – Oktobro 2003
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| Redaktoro | Subredaktoroj | Desegnistino |
|---|---|---|
| Jim Medrano (212) 982-5029 | Thomas Eccardt, Nancee Medrano | Mary Pulley |

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com



© 2003 Esperanto Society of New York